Antaŭ nelonge Esperanto-libro aperis en Nederlando sub la titolo "La Nevenkebla Ĝeno". Mi ankoraŭ ne legis ĝin, sed mi aŭdis, ke ĝi estas interesa kaj leginda. La titolo tamen donas al mi okazon por ion rakonti pri la stranga origino de la vorto *ĝeno*.

Doktoro Zamenhof prenis la radikon *ĝen-* el la franca lingvo (*gêne*), ĉar ĝi estas sufiĉe internacia kaj ekzistas en la germana, pola kaj aliaj lingvoj. La franca lingvo ricevis la vorton el la latina (*Gebenna*), la latina el la greka (*geenna*), la greka el la hebrea (*gehinom*). Gehinom estis valo proksime al Jerusalemo. La vorto signifas *valo de Hinom* aŭ *valo de ĝemado*. En la Malnova Testamento ni legas, ke en tiu valo la terura dio Molok estis honorata per homaj oferoj. Reĝo Akaz tie eĉ mortigis honore al la diaĉosian propran filon (II. Reĝoj 16-3), kaj same agis Reĝo Manase (II. Reĝoj 21-6). La profeto Jeremia malbenis la valon (Jer. 7; 32-33): "Pro tio jen venos tempo, diras la Eternulo, kiam oni jam nomos tion ne...valo de la filo de Hinom, sed valo de mortigado... Kaj la kadavroj de ĉi tiu popolo estos manĝaĵo por la birdoj de la ĉielo kaj por la bestoj de la tero, kiujn neniu fortimigos."

La judoj tial konsideris la valon loko malbenita. Oni uzis ĝin por forĵeti rubaĵojn kaj kadavrojn de mortintaj bestoj. Oni konstante bruligis fajrojn tie por protekti la homojn de eblaj epidemioj. Iom post iom la nomo *gehinom* fariĝis samsignifa kun ŝeol (infero). En la Evangelioj tial la greka vorto *geenna* estas unu el la nomoj de la infero. La Evangelio de Sankta Mateo uzas la esprimon *geenna tou pyros* en la greka teksto, *Gebenna ignis* en la latina traduko (Mat. 5-22). La Esperanto-Biblio, kiu ĝenerale estas pli laŭvorta ol nacilingvaj tradukoj, sekvas la grekan tekston, dirante: "Kiu diras: Malsaĝulo, tiu estos en danĝero de Gehena de fajro". La du plej vaste konataj angla-

lingvaj tradukoj (Eldono de Reĝo Jakobo por la protestantoj, Eldono de Rheims-Douay por la katolikoj) tradukas "infera fajro" (*bell fire*).

En moderna uzo la vorto *ĝeno* tute perdis sian antaŭan fortan signifon. Dirante al iu gasto "Ne ĝenu vin, Sinjoro", neniu plu pensas pri la infero, pri valo en Palestino kaj pri infanoj bruligitaj honore al la dio Molok.

Se *ĝeno* estas ekzemplo de radikala ŝanĝo de vortsignifo, *silko* estas vorto, kiu post multaj ŝanĝoj retrovis sian unuan enhavon. Mi diris en antaŭa artikolo, ke *silko* kaj *serĝo* venas de la latina vorto *sericum*, kiu signifas *ĉina*. Tio tamen nur estas parto de la historio. La greka kaj latina lingvoj havis du nomojn por Ĉinujo: *Sinai* (*Sinae*) kaj *Seres*. Oni opiniis dum longa tempo, ke ili estas du tute malsamaj landoj, la unua atingebla per marvojaĝo el Hindujo, la dua per transkontinenta karavano tra Centra Azio. La vorto *Sinae*, el kiu devenas nia vorto *ĉina*, korespondas al malnova sanskrita (hinda) vorto *Cina* kaj al la feŭdala ŝtato *Ĉin* aŭ *Tsin* en Okcidenta Ĉinujo. La vorto *Seres* (kiun ni retrovas en la angla vorto *sericulture*) venas de la greka *ser* aŭ *sir*, kiu signifas *silka raŭpo*. La vorto venas el la ĉina lingvo.

La ĉina ideogramo (vortsigno) por *silko* estas dekparta fadeno devolvata de paro da dubobenaj spindeloj. La signo nun estas elparolata *su* (kiu cetere estas sufiĉe proksima al la franca *soie*, elp. *sŭa*), sed en antaŭaj tempoj la elparolado estis *si*, *se*, aŭ *sil*. Nun ankoraŭ en la korea lingvo la sama ideogramo estas elparolata *sil*. Oni povas do diri, ke la Esperanto-vorto *silko* kaj la angla vorto *silk* venas el la ĉina aŭ la korea lingvo.

—W. S.

"Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (kun speciala elmon-
tro de la Zamenhofa lingvuzo) Eugen Wüster. Giganta verko, tre
utila por profunda studo de Esperantaj vortoj, ktp. Jam eldoniĝis 4
volumoj (A-Kor). Ĉiuj 4 grandaj volumoj, \$14 afrankite.

EL LA HISTORIO DE AMERIKA ESPERANTISTO

BABI LE MULO

DAŬRIGO (dua kaj fina parto). Vidu ankaŭ la ĉefartikolon je paĝo 80, kun represo de *Letero de Zamenhof* 1907 al la unua oficiala Esperanto-gazeto de la Nord-Amerika movado.

La gazeto de S-ro Baker restis la sola Esperanto-gazeto en Usono por nur tri monatoj. Jam de 1905, kiam Amerika Esperanto-Asocio (poste transformita en la Esperanto-Asociation de Nord-Ameriko) fondiĝis en Boston, ĝiaj fondintoj decidis publikigi gazeton sub la nomo "The American Esperantist". La unua numero povis aperi nur en Januaro 1907, sub redakto de S-ro J. F. Twombly, kaj ĉar S-ro Baker jam estis uzanta la titolon "Amerika Esperantisto" (li forigis la malbelan *L'* post la tria numero), la oficiala organo de AEA nomiĝis "American Esperanto Journal" ("Amerika Esperanto-Jurnalo"). En tiu jaro do aperis du gazetoj, "Amerika Esperantisto" en Chicago (kien S-ro Baker estis movinta sian eldonejon) kaj "Amerika Esperanto-Jurnalo" en Boston kaj poste en New York. En Majo 1908 la du gazetoj kunfandiĝis. Anoncante tion, S-ro Baker skribis: "Estas kelkaj miloj da legantoj, kiuj sendube pensis, ke AE estis la sola Esperanto-organo en Usono, ĉar ĝi faris la plej laŭtan kaj plej senĉesan bruon. Tamen..." Liaj rimarkoj pri la malaperinta konkurencinto tute ne estis afablaj.

Traleĝante la jarkolektojn nun, post 40 jaroj, kritika observanto miras pri la bona kvalito kaj bela aspekto de la du gazetoj. Ambaŭ estis bonaj, kvankam ili estis tute malsamaj. AE estis la organo de unu viro, S-ro Baker, kiu skribis en Februaro 1907: "Mi nun laboras 14 horojn ĉiutage". Li estis estinta prelegisto en amaskunvenoj tiutempe nomitaj "Lyceum". Lia stilo respogulis la flaman oratoradon de la prelegtribuno kaj samtempe la atakemon de la pionira ĵurnalismo de okcidenta Usono. La argumentoj estis frapaj,

kvankam ne ĉiam logikaj; la faktoj estis prezentataj en vigla, interesa, kolorplena maniero, kvankam ofte kun troigo kaj trosimpligo. Legante liajn artikolojn, oni havas la impreson, ke oni aŭskultas sinceran kaj ŝatindan personon, kiu batalas por granda afero kaj kies entuziasmo estas preskaŭ nerezistebla. Lia ĉefa intereso estis, ne servi la Esperantistojn, sed varbi novajn anojn por la movado. Tial li ĉiam denove reprenis gramatikon kaj vortareton, ĉiam ripetis la samajn argumentojn. Preso, papero kaj tipografia aranĝo estis bonegaj. La kovrilo eĉ nun estus konsiderata moderna kaj bongusta (kvankam laŭ mia opinio ĝi ne estis tiel bela kaj okulfrapa kiel la nuna). La gazeto aperis ĉiunmonate (aŭ preskaŭ) kun 16, 24, 32 kaj kelkfoje eĉ 64 paĝoj. Oni do preskaŭ povus envii la "malnovan" AE de antaŭ 40 jaroj. (Kompreneble, sekvante la modernan evoluon en ĵurnalismo, la nuna AE prezentas sian enhavon en multe pli konciza kaj "densa" formo.) AE en tiu periodo gajnis multajn novajn Esperantistojn. La estinta Prezidanto de EANA, Profesoro Edwin L. Clarke, kaj la estinta Ĝenerala Sekretario, S-ro Joseph Leahy, fariĝis Esperantistoj antaŭ 40 jaroj, ĉar ili hazarde trovis numerojn de AE.

Kiel decidis por gazeto aperanta en Boston, "Amerika Esperanto-Ĵurnalo" havis pli altan nivelon ol AE, uzis trankvilan, respektindan stilon, publikigis pli grandan kvanton da novaĵoj kaj havis sufiĉe grandan kunlaborantaron. Ĝi enhavis pli multe da materialo en Esperanto, malpli en angla lingvo. Papero, preso kaj aranĝo estis malpli bonaj ol tiuj de AE, kaj ĝi tute ne havis la ĉarmon de tiu senkompare vigla stilo kaj de tiu rekta alvoko al la leganto, kiuj estis la forto de AE.

AEĴ publikigis detalajn raportojn pri la diversaj Esperanto-kluboj, kiuj estis multnombraj kaj agemaj. Komence de 1908 ĝi enhavis interesajn priskribojn pri la agado de Edmond Privat en Usono kaj Kanado. S-ro Privat, juna visio (nun Profesoro en la Universitato de Neuchâtel) venis al Usono por propagandi Esperanton kaj instrui la lingvon

laŭ propra "paroliga" metodo. AEĴ raportis, ke S-ro Privat eĉ klopodis varbi Prezidanton Theodore Roosevelt por Esperanto. AEĴ ankaŭ enhavis interesan raporton pri per-Esperanta vojaĝo tra Rusujo kiun faris en 1907 S-ro Edward K. Harvey, Sekretario de la Bostona Esperanto-Societo.

Inter la materialo, kiun AE publikigis antaŭ 40 jaroj, estis rimakinda traduko de la Konstitucio de Usono, farita de S-ro George Winthrop Lee.

En 1911 S-ro Baker, ĝis tiam sola posedanto de AE, vendis la gazeton al grupo da Esperantistoj, kaj D-rino Ivy Kellerman Reed fariĝis ĉefredaktorino. Artikoloj verkitaj en bonstila, klasika Esperanto, serioza prezentado de faktoj kaj argumentoj, kunlaborado de multaj el la plej famaj Esperantistoj el ĉiuj landoj gajnis al AE en tiu epoko tre altan reputacion en la tutmonda Esperantista gazetaro. Post tiu epoko AE vojaĝis al diversaj urboj, preskaŭ ĉiam sekvante la Centran Oficejon de EANA (Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko). Ĝi havis brilajn sukcesojn kaj suferis malsukcesojn kaj sortobatojn. Ĝi kaŭzis multe da kapdoloroj al sinsekvaj redaktoroj, kies klopodoj ofte estis vanaj, ĉar multaj Esperantistoj ne komprenis la gravecon de bona gazeto kaj preferis fondi privatajn gazetojn, gazetetojn kaj gazetaĉojn aŭ bojkotis la ĵurnalon, ĉar ĝi ne ĉiam kontentigis iliajn personajn dezirojn kaj ne suface flatis ilian vantecon kaj ambicion.

En 1933-34 AE preskaŭ mortis, dronante en ŝuldoj kaj konfuzo. Tiam S-ro Joseph Leahy, kvankam jam maljuna, savis la ĵurnalon kaj savis EANA. En formo modesta kaj multobligita (laŭ la ofset-metodo) li tenis la gazeton "super la akvo" dum preskaŭ dek jaroj. En 1943 S-ino Mabelle L. Davis redonis al ni gazeton bele presitan. En 1944 la gazeto venis al New York, "ĉefurbo de presado kaj publikigado en la mondo".

Se ĉiuj eksredaktoroj de AE verkus siajn "rememorojn", la volumo farus interesan legaĵon. Ĝi estus plena de entuziasmigaj kaj kortuŝaj faktoj pri fideleco kaj oferemo sed

ankaŭ de penigaj ekzemploj de blindeco kaj malkompreno. Tamen, "cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante". Starante sur la ŝultroj de siaj antaŭuloj, la nuna redaktoro de AE kaj liaj gekunlaborantoj daŭrigas la laboron komencitan antaŭ 41 jaroj kaj adaptas ĝin al la bezonoj de nova epoko. AE devas esti inda de sia pasinteco kaj inda de sia tasko: disvastigi la scion kaj uzon de Esperanto en Nord-Ameriko. Kun justa fiereco Ivy Kellerman Reed, diris en Marto 1911: "Kelkaj el la plej eminentaj eŭropaj Esperantistoj skribis, ke AE nun okupas la unuan lokon en sia klaso." Kun sama fiereco ni rajtas diri, ke tio estas denove vera. Nia eminenta kaj leginda kolego, "Brita Esperantisto", bonvolis skribi en la numero de Septembro-Oktobro 1947, ke "AE staras en la unua vico de Esperanto-gazetoj" kaj ke "ĝi estas unu el la plej bonaj naciaj Esperanto-gazetoj kaj meritas larĝan disvastigon." Similaj komplimentoj atingis nin el multaj landoj. Tamen komplimentoj ne sufiĉas por disvastigi, plibonigi kaj pli-grandigi nian gazeton kaj — kun ĝi — la Esperanto-movadon. Ni bezonas pli multe da membroj por EANA, pli multe da abonantoj por AE, pli multe da kunlaboro kaj komprenemo por la agado de la Centra Oficejo, kiu kelkfoje faras erarojn — kiel niaj antaŭuloj faris, sed kiu baraktis kaj baraktadas kun mil malfacilaĵoj kaj kiu "laboras 14 horojn ĉiutage", kiel S-ro Baker faris antaŭ 40 jaroj.

[FINO]

"*Historio de la Lingvo Esperanto*", Edmond Privat. Vol. 1: *Deveno kaj Komenco 1887-1900*. Vol. 2: *La Movado 1900-1927*. Entute 273 pp. *La du volumoj kune*, \$2.20 *afrankite*.

"*Esperantismo — Artikoloj pri la Esperanto-Movado*", I. Gomes Braga. Enhavo: *La Malpermeso*; *Dum la Milito*; *Rotary Club Atendas Novan Lingvon!*; *Tutamerikanismo*; *Doris Tappan Connor Vizitas Nin*; *Religiaj Lingvoj*; *Datreveno de Nia Majstro*; ktp. Bona stilo. Sufiĉe facila legaĵo por studentoj kaj kursoj. Mendu ilin en kvanto po 10c. *Unu kostas 15c afrankite*.

LA ESPERANTO-STUDANTO

Invito al Festo

(Du gejunuloj renkontiĝas sur la strato.)

Li: Bonan tagon, F-ino Belo. Kiel vi sanas hodiaŭ?

Ŝi: Tre bone, dankon, kaj vi?

Li: Ankaŭ tre bone. Mi preparas specialan feston en mia hejmo, kaj mi deziras inviti vin ĉeesti.

Ŝi: Vi estas tre afabla, S-ro Grizo. Ĉu ĝi estos granda festo?

Li: Ĝi estos tre eleganta festo. Mi invitas ĉarmajn personojn, kiuj povas paroli sprite kaj bonhumore. Mi aranĝis por speciala muziko de tre fama orkestro... per la radio, kompreneble!

Ŝi: Ĉu vi havas bonan lokon por danci?

Li: Ho, jes... oni povas danci se oni deziras... aŭ nur sidi kaj aŭskulti... aŭ nur paroli. La kunuloj estos tre talentaj.

Ŝi: Je kiu dato estos la festo?

Li: Sabaton vespere je la oka. Kaj mi ankaŭ aranĝas bankedon, kun la plej bongustaj manĝaĵoj. Ĉu vi ŝatas fragojn kun kremo?

Ŝi: Mia favorata!

Li: Kaj, ho, F-ino Belo... la personoj, kiuj venos... Ĉu mi jam klarigis? La plej belaj, la plej inteligentaj... kiuj ĉiam konversacias tre amuze. Ĝi estos vere speciala okazo!

Ŝi: Ĉu jes? Nu, kiuj estos tie?

Li: Nur vi kaj mi!

Invitation to a Party

(Two young people meet on the street.)

He: Good day, Miss Belo. How are you today?

She: Very well, thanks, and you?

He: Also very well. I am preparing a special party in my home, and I wish to invite you to attend.

She: You are very kind, Mr. Grizo. Will it be a big party?

He: It will be a very elegant party. I am inviting charming people, who can talk wittily and humorously. I have arranged for special music by a very famous orchestra... by the radio, of course!

She: Do you have a good place to dance?

He: Oh, yes... one may dance if one wishes... or only sit and listen... or only talk. The company will be very talented.

She: What date is the party?

He: Saturday eve at eight. And I'm also arranging a banquet with the finest food. Do you like strawberries with cream?

She: My favorite!

He: And, oh, Miss Belo... the people, who are coming... Did I explain already? The most beautiful, the most intelligent... who always converse very amusingly. Truly a special occasion.

She: Is that so? Well, who will be there?

He: Just you and I!

KANADA INFORMO

Vern Bruder, Hamilton, Ont., raportas, ke li konstante uzas la malgrandajn propagandilojn "For Better International Understanding". Li sendas ilin al instruistoj kaj aliaj en la eduka sistemo. La Centra Oficejo ĝojas raporti, ke de tempo al tempo ni ricevas demandojn kaj membrecojn, kiuj estas evidente la rezulto de lojala laboro de Kanadaj kaj Usonaj membroj en tiu kampanjo.

Andrew O'Reilly antaŭe de Toronto nun troviĝas en Vancouver, kie li daŭrigas sian intereson en Esperanto. Li sendis Patronan Membrecon al EANA antaŭnelonge kun la vortoj: "Bondeziron por la daŭra progreso de EANA, kaj gratulon pro via nuna bonega laboro."

Nova membro de EANA kaj nova alveninto al Kanado estas *Colin Smith* en Halifax. S-ro Smith ĵus venis de Anglujo, kie li komencis la lernadon de Esperanto antaŭ unu jaro. Bonvenon al Ameriko!

Nova kurso de Esperanto komenciĝis en Aprilo en Fort William, Ont. S-ro *Cameron Macdonald* gvidas la grupon. S-ro Macdonald fariĝis Esperantisto nur iom antaŭ la Toronto Kongreso, sed depost tiu tempo li fervore kaj vigle laboras por antaŭenigi la movadon en Fort William.

Du longaj kolonoj pri Esperanto kaj Basic English aperis en la Ĵurnalo Argus, St. Mary's Ont., Marto la 17-an, 1949. Sub la titolo "Ten Million Signatures", *Pastro R. Edis Fairbairn* klarigis la avantaĝojn de Esperanto kaj la praktikajn uzojn de la interlingvo kompare al la mankoj de Basic English.

Hugo Gerisch, senlaca laboranto por Esperanto dum 39 jaroj enmetas de tempo al tempo leterojn pri Esperanto en sian lokan gazeon en Picton, Ont. Lastatempe, aperis tre trafa letero pri la praktika uzo de Esperanto en Universalaj Kongresoj.

ESPERANTO-KRONIKO

“*Kiu en Usono sukcesis aŭdi la Esperanto-radiodissendojn de Eŭropo?*”, estis demando de *Lawrence A. Sharpe* en North Carolina. La Centra Oficejo volonte ricevos informon de gemembroj pri provoj kaj sukcesoj tiurilate.

Jurnaloj en Panamo kaj la Kanal-Zono multfoje presis artikolojn pri Esperanto kaj la utilo de la interlingvo. La instiganto de tiuj raportoĵoj estas Dumviva Membro de EA NA, *Van Allen Lyman*, kiu loĝas en la Kanal-Zono. En la klopodo por interesi la Kolegion, S-ro Lyman hazarde informiĝis, ke sperta Esperantisto *E. A. Young*, jam funkcias en la Koresponda Servo de la Eduka Sistemo tie. Raporto en la ĵurnalo “*La Nacion*” menciis, ke S-ro Young interesiĝis pri Esperanto antaŭ multaj jaroj. “Li dediĉis tempon dum sia lunĉ-horo al ĝia studado, kaj lernis Esperanton dum 50 horoj!”

Sacramento Adult Evening College enmetis kurson de Esperanto pasintaŭtune, sub la gvidado de *F-ino Helene Wolff. H. E. Dillinger*, Senatano de la Ŝtata Parlamento de Kalifornio favoris la kurson kaj aranĝis ekskurson kaj akcepton ĉe la Parlamentejo por la grupanoj, kiam ili vizitis la ĉefurbon dum la printempo.

Milton R. Davis, Sanitarium, Calif. raportis, ke li komencis novan kurson en Esperanto en Aprilo. Li entuziasme instruas per la uzo de Cseh-Metodo kaj la nova libro “*Esperanto: The World Interlanguage*”. Al instruistoj ni deziras rimarkigi, ke tiu kombino vere faras tre viglan, tre progresigan kurson.

Nederlanda Aervetura Kompanio (KLM) eldonis en la lingvo Esperanto novan informilon pri la historio de tiu aerkompanio. Ĝi estos senpage sendata al ĉiu petanto. Oni direktu la petojn al: Ĉefoficejo de KLM, Sekcio Informservo, Raamweg 90, Den Haag, Nederlando — aŭ al oficejo en via lando.

ESPERANTO-KRONIKO

Esperanto-Klubo de Los Angeles starigis Esperanto-kurson por siaj gemembroj kaj aliaj, sub la gvidado de *H. Elwin Reed*. Tiel la anoj havas oportunon perfektigi kaj ekzerci en Esperanto. La kurso komenciĝas je la 7:30 pm, ĵus antaŭ la regula monata kunveno de la Klubo. Imitinda ekzemplo.

Aŭstria Ŝtata Trafikoficejo starigis specialan Esperanto-sekcion, laŭ raporto de la Aŭstria Esperantista Federacio. Sukceso en tiu faro dependas de la Esperantistoj tutmondaj. La Federacio petas al ĉiu Esperantisto subteni ilin per skribo de gratulkartoj al la sube menciita adreso. Ĉiu skribinto ricevos belan prospekton pri Aŭstrio afrankite per la nova Esperanto-poŝtmarko (kiun Aŭstrio baldaŭ eldonos). Adreso: *Aŭstria Trafikoficejo, Esperanto-Sekcio, Friedrichstr. 7, Wien I, Austria*.

"*The Oregonian*", grava tagĵurnalo de Portland, Oregon, freŝdate publikigis leteron de samideano *Leo Tanaka* pri la lernado de Esperanto. Li citis lokojn, kie oni instruas la interlingvon, kaj finis per informo, ke EANA sendas senpage al ĉiu petanto informon pri Esperanto. (Alvenas multaj leteroj, kaj ni volonte plenumas tiun postulon.) Aliaj membroj faru same!

La Esperanto-Klubo MOSAMO raportas daŭran aktivecon kaj bonan sukceson en sia prezentado de semajna radio-programo pri Esperanto. Ekspozicio por la Publika rezultas en disdono de centoj da propagandiloj. La grupo ankaŭ prezentas prelegojn antaŭ la Rotaria kaj aliaj kluboj en la urbo. Letero de la Kluba Konsilanto, *John M. Brewer*, diris: "Ni multe ĝuis la novan gazeton, AE, kaj uzis ĝin kiel parton de nia ekspozicio en kunveno de unu el la Urbaj Kluboj." Estroj de la Klubo Mosamo estas: *Floyd Hoffman*, Prezidanto; *H. E. Spindle*, Vic-Prezidanto; *D. Konvisor*, Direktoro; *W. E. Salomo*, Program-gvidanto.

ESPERANTO-KRONIKO

Ekspozicio pri Esperanto dum Ŝtata Konferenco de Instruistoj de Florido okazis sub la gvidado de *P. H. Hensley*, Tampa, Florido. Per seĝo, tablo, nigra tabulo kaj kolekto da libroj, gazetoj, afiŝoj, poŝtkartoj, ktp., S-ro Hensley pasigis du tagojn parolante al personoj, kiuj haltetis por informiĝi pri Esperanto. Li disdonis pli ol 200 folietojn. Bonege!

Farante publikajn prelegojn pri internaciaj problemoj en multaj urboj, D-ro W. Solzbacher, Prezidanto de EANA, ofte havis okazon mencii Esperanton aŭ respondi demandojn pri ĝi. Lastatempe tio okazis ekzemple en Detroit kaj Toledo. Parolante pri liaj prelegoj, lokaj ĵurnaloj ofte atentigas pri Esperanto. Tio okazis antaŭ nelonge en New York, White Plains, Scarsdale, Tuckahoe, Baltimore, Boston, Toledo, ktp.

Scienca Revuo komencis aperi en la bone konata eldonejo J. Muusses en Nederlando. S-ro W. P. Roelofs estas la redaktisto. La revuo aperas en kvaronjaraj kajeroj 40-paĝaj. Abonojn (\$2.00 jare) akceptas *Amerika Esperantisto*, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.

S-ro *Gabriel Chavet* en Paris, kiu dum multaj jaroj estris la Esperantistan Centran Oficejon en Paris kaj akompanis D-ron Zamenhof en lia vizito al Usono en 1910, skribis antaŭ nelonge al la Prezidanto de EANA: "Legante la numeron de 'Amerika Esperantisto', mi tre plezure konstatas, ke la movado en via granda lando persistas kun vigleco. Mi lernis Esperanton en 1896, antaŭ pli ol duonjarcento, kaj mi restas fidela je la idealo de D-ro Zamenhof. Mi ĉeestis kun li, kiel Sekretario de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, je la 6-a Universala Kongreso de Esperanto en Washington en 1910. Tio restas por mi tre interesa memoro... Mi deziras prosperon kaj feliĉon al la usona Esperanto-movado."

ESPERANTO-KRONIKO

Pri la gazetfonda febro en la Esperanto-movado aperis trafa artikolo en "Flandra Esperantisto". "Ho ve!", ĝi diris. "Dum ni fieras pri internaciaj gazetoj kaj revuoj, kiaj Heroldo aŭ Literatura Mondo, aŭ pri naciaj kiaj Amerika Esperantisto kaj La Ponto (ni nur citas tiujn, pri kiuj ni tuj pensas, ĉar ni plej ofte havas ilin en la manoj), kiom da etaj presaĵoj, kiujn ni ofte ŝatas pro ekstera kialo, sed kiujn ni ne povas nomi gazetoj."

McGuire's Inprint, belaspekta malgranda gazeto, kiun grava firmo pri komerca reklamo, "Moresales Associates" en New York, sendas al siaj klientoj, enhavis kvinpaĝan artikolon pri Esperanto en sia numero de Marto 1949. Ĝin verkis la prezidanto, S-ro Joseph D. McGuire mem, uzante materialon el la nova propagandfolio de EANA, "For Better International Understanding". Li konkludis: "Skribu al la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko... Ĉion ricevos tiu, kiu serĉas. Mi deziras al vi, ke vi trovu ĝojon en la aventuro kaj ke vi profitu per ĝi!"

Artikolo de Profesoro Albert Guérard, "The Last Frontier: Language" (La Lasta Limo: Lingvo) aperis en la printempa numero de "Southwest Review" (Sudokcidenta Revuo). Diskutante la interlingvan problemon, ĝi estas ĝenerale favora al Esperanto. Prof. Guérard kondamnas la "lingvan imperialismon", kiu estas la bazo de Baza Angla kaj diras: "Mia ĉefa intereso estas la helpo, kiun internacia lingvo povas doni al la konscio de tutmonda unueco. Mia gvidanto en tio estis D-ro Zamenhof."

La UEA-Jarlibro por 1949 aperis en Majo kiel bela volumo 244-paĝa. Krom aliaj informoj ĝi enhavas la adresojn de 2,224 Delegitoj en 58 landoj, inter ili 104 Del. en Usono kaj 8 en Kanado. Kotizoj por individua membreco en UEA (\$1.25 por Membroj kun Jarlibro, \$3.00 por Membro-Abonantoj) povas esti sendataj al EANA.

ESPERANTO-KRONIKO

La Nova Internacia Jarlibro (New International Year Book) de la grava firmo Funk & Wagnalls en sia eldono por 1949 ne nur enhavas detalan artikolon de D-ro W. Solzbacher pri Esperanto, sed ankaŭ artikoleton pri EANA en la fako pri Societoj kaj Asocioj. Ĝi ankaŭ atentigas pri la EANA-Kongreso en Wilmington kaj la Universala Kongreso de Esperanto en Bournemouth.

Financa subteno de registaroj al Esperanto-organizoj lasttempe fariĝis pli ofta. En Aŭstrujo la Urbo Vieno finance subtenas la movadon laŭ decido de la Urba Konsilantaro. La Regiona (ŝtata) Registaro de Stirio kaj la Urbo Graz finance subtenas la nunjaran Aŭstran Esperanto-Kongreson en Graz.

D-ro Edmond Privat, estinta Prezidanto de UEA kaj de la Internacia Centra Komitato, nun Profesoro en la Universitato de Neuchatel, Svisujo, skribis al la Prezidanto de EANA: "Mi sekvas viajn klopodojn kun tre speciala intereso, ĉar Usono estis mia unua laborkampo kiel propagandisto en 1908... Ĉu nia movado logas junulojn en Usono?" D-ro Privat ankaŭ diris, ke li "tre ŝatis la belan libron: *Esperanto, The World Interlanguage*".

Estas interese konstati, ke la vorto "Esperanto" jam fariĝis, en ĉiuj rondoj, samsignifa kun "interlingvo". Ekzemple, *Komandanto R. E. Lambert* lastatempe rimarkigis al ni, ke en la libro sub redaktado de Sumner Welles, "Gvidlibro pri Paco", troviĝas la jena frazo: "...la Hanoas, miksitaj sudana, negra, kaj araba grupo, kies lingvo etendiĝas tra la regiono kiel *iu komerca Esperanto*." En radio-komento, Deems Taylor, fama muzika kritikisto, same uzis la frazon: "Muziko estas la Esperanto de la artoj". Kaj en Eŭropo, antaŭnelonge, famkonata Kardinalo de la Katolika Eklezio nomis la latinan lingvon "la Esperanto de la katolika mesliturgio".

DEZIRAS KORESPONDI

Argentino. Jorge P. Bondone, Irigoyen 428, *Bell Ville* (Cordoba). 18-j. gimnaziano dez. kor. pri literaturo kaj muziko.

Belgujo. Alain Scheldeman, rue Wahis 186, *Menin* (Fl. OCC.). 18-j. skolto dez. kor. pri sporto, muziko. Kolektas PM.

Koreo. S-ro Manjong Kim, 544 Ponsung Dong, *Chinju*. Dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Italujo. F-ino Libera Pelissero, Via Banchette no. 16, *Torino*. 24-j. oficistino dez. kor. kun juna samideano.

Germanujo. Myron Dachniwysky, (13b) Weyarn, Kreis Miesbach, *München* (U. S. Zono). 21-j. Ukraina teknika inĝeniero dez. kor.

Hispanujo. R. J. Lopez Herrero, Conde Penalver 52, *Madrid*. 32 jara, fotografiisto. Dez. kor.

Bulgario. Onnik Sogomonian, Dr. Nider 5, *Burgas*. Dez. kor. kun filatelistoj.

Bulgario. Stefan Hr. Kosev, Strato Rilska 4, *Burgas*. Dez. interŝ. tute kompletan serion da PM.

Ĉekoslovakio. Yaroslav Šedek, Leninova 14, *Chomutov*. 20-j. studento de elektrotekniko dez. kor.

Darlando. Bebel Sorenson, *Farum*. 27-j. tipografiisto dez. kor. kun amerikanoj.

Germanujo. Franz Hauer, (17b) Freiburg/Br. Betzenhausen, Sigsteinstr. 16 II, *Baden*, Franca Zono. Katolika grupo dez. kor.

Germanujo. Josef Campigne, 22c *Koln-Deutz*, Siegburgerstr. 159, Brita Zono. 18-j. dez. kor. kun junuloj samaĝaj.

Germanujo. Willy Weilepp, vor dem Hamstertor 6 III, 19a *Halle (Saale)*, Land Sachsen-Anhalt, Rusa Zono, Dez. kor.

Hungario. Štefano Mayer, Erzsebet kir. ut. 89, *Budapest XIV*. 24-j. taksi-ŝoforo dez. interŝ. PM.

Irlando. Jim Vale, 26 Stiles Road, Clontark, *Dublin*. Dez. kor. kaj interŝ. PM en Usono kaj Kanado.

Svedujo. Gösta Andersson, Bondegatan 4, *Strängnäs*. Komercesto, amatorfotografiisto, dez. kor. kun samfakuloj, interŝ. amatorfotojn. Skribu, sendu bildojn; certe respondos kaj rekompencos.

Urugvajo. Elsa Bencourt, Madrid 1576, Apt. 11, 1er Piso, *Montevideo*. 22-j. instruistino dez. kor. kaj interŝ. il. PK.

Urugvajo. Alicia Porro Freire de Maciel, Direktorino, Junulara Gazeto "Compañeros", Canelones 1122, *Montevideo*. Grupo de gejunuloj arde dez. interŝ. PK kaj PM kun eksterlandanoj.

Japanujo. S-ro Torii Junji, 1-9 Taruyamati Kitaku, *Osaka*. Studento en komerca universitato dez. kor.

POPULAR NOVELS IN ESPERANTO

<i>Murdo en la Orienta Ekspreso</i> , Agatha Christie, excellent & easy "thriller." Most popular of the "Epoko" series....	.50
<i>La Vidvineto</i> , J. de Alencar, love story of romantic Brazil, one of best beloved stories in South America40
<i>En Okcidento Nenio Nova</i> , Erich Maria Remarque, famed story "All Quiet on the Western Front," new stock, bound	2.75
<i>D-ro Dorner</i> , H. L. Egerrup, original and new novel about artificial insemination and a doctor's problems	1.85
<i>Kudlago, La Malgranda Eskimo</i> , N. Van Hichtum, 40-page story of native youth in Greenland. Easy and interesting.	.30
<i>Gösta Berling</i> , Selma Lagerlöf, the great story of Sweden's beloved author, in 2 parts, both in one de luxe volume, absolutely a "must" for every Esperantist, cloth	3.00
The same volume, also complete, but bound in paper....	2.35
<i>Sep Fratoj</i> , A. Kivi, one of Finland's greatest novels, now being acclaimed as a great event in Esperanto. Bound....	3.50
<i>La Granda Aventuro</i> , Szilagyi, several good novels in one volume. One of the "Stelo-Libro" series. Bound in bds....	2.25

SELECTED DRAMATIC WORKS

<i>La Blanka Malsano</i> , Karel Čapek, unique 3-act drama which cleverly utilizes as a theme "the great white plague" to illustrate totalitarianism in all forms, and its "cure" in democracy as we know it in the "West." This great drama of the pre-war Czech author is really excellent. And it is printed and bound most beautifully. Cloth.....	1.50
<i>Pasko (Easter)</i> , August Strindberg, famed Swedish drama in three acts. Excellent Esperanto translation. Paper.....	.60

NEW DANISH BOOK JUST RECEIVED

<i>Faktoj pri Danlando</i> , of the international series "Kiu-Kio-Kie." It is Denmark's equivalent of our "World Almanac," printed in Esperanto by the great newspaper <i>Politiken</i> . It is a remarkable encyclopedic booklet of 64 pages, on everyone-everything-everywhere of any importance to Denmark. Profusely illustrated, color plates and maps, and strictly up-to-date. An important contribution to the Esperanto movement. Use it in your promotion kit75
-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	-----

Note, that when you buy books from *American Esperantist*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

IMPORTANT BOOKS FROM BRAZIL.

Official Publications of the Government

Books of great value to our movement, not only for high quality as Esperanto literature but also because they are published by official departments of the Brazil Government. These two quite different volumes serve as irrefutable answers to the question: "Do important organizations and governments use Esperanto?" They should be in every Esperantist's library.

"Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo"

Entirely in Esperanto. Selections of articles published by the official Brazilian National Council of Geography. Beautiful volume on the life, customs, and country of Brazil (the Amazon, jungles, gauchos, natives, wondrous plants, diamond-hunters, etc.) Richly illustrated with 37 large full-page art engravings, suitable for exhibit or framing. Best coated paper, 152 pp, large format 7" x 10½". We have been notified of recent price rise, but while present stocks last you may choose as follows: Art-card covers \$2.50; card panels over leatherette \$3.25; leatherette stamped in gold \$4.00 postpaid.

"Statistika Resumo pri Brazilo"

All material in 3 languages: English, Portuguese, and Esperanto. A large and impressive book of Brazil statistics with full indices, by the official Institute of Geography and Statistics. Physiography, demography, economy, social welfare, culture, administration (with divisions in great detail). The full listing of terms in all fields, makes it a real contribution to Esperanto terminology (with English and Portuguese equivalents). A purely statistical and scientific production, with preface, indices and chart. 267 pp (nearly an inch thick), large format 7¼" x 10½", bound in strong flexible card covers. While they last, \$3.00 postpaid.

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.